



3(187)
2022

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo **ESPERANTO**

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Josif Brodski (1940 – 1996)

esperantigis Lidia Ligęza

Hom' pereas (aŭ Kanto pri Bosnio)

Kiam vi dum vespermanĝo
apogas sistem-aranĝon,
ĉe vodko post stultaĵ' veas –
hom' pereas.

En antikvaj, belaj urboj
hororo igas perturbojn,
songante pri sav' idea –
hom' pereas.

En vilaĝoj ne estantaj
pro marŝ' de morto konstanta –
fide al esper' pasea
hom' pereas.

Kiam por pac' vi voĉdonas
kaj en etik-duboj dronas
kun konscienc' malobea –
hom' pereas.

Kiam distron vi avidas,
matĉon ĝuas televidan
aŭ dum enu' apogea
hom' pereas.

Jen estas ideo nova:
l' homaro transvivi provas,
kvankam Kain' korifeas –
hom' pereas.

Adorante leĝojn piajn
de Talmud', Koran', Biblio,
kiujn ĉiu kredo kreas –
hom' pereas.

Ĉiu kred' enhavas krimojn,
estas sbiroj kaj viktimoj –
via muto ne mensogas,
montros, kiun vi apogas.

En horloĝo krom iro estas er' de muto.
Ĉe tio voj' kaj rondo kune ne kongruas.
Tiel kiel en horloĝ': laŭ destin' viv' tuta
de kato kaj de muso ambaŭflanke fluas.
Ili bruas, eraras en horoj kaj datoj,
sed tiu kaos', batal' senĉese daŭranta
estas ne rimarkeblaj, krom en vilaĝ-hatoj,
kie en ĉiu domo bestoj vagas lante.
Tie palas en memor' kaj nuntempa horo
kaj de pasintaj jaroj senforma patino
malaperas – precipe dum vintro, en foro,
kiam en dom' premiĝas ŝafinoj, kaprinoj.

Josif BRODSKI estis elstara rusa-usona poeto kaj eseisto, unu el la plej junaj laŭreatoj de Nobel-premio, kiun li ricevis en 1987 j.

Li estos aŭtoro de 28 diverstemaj libroj, tradukis anglan kaj polan poezion (i.a. de C. Miłosz kaj Z. Herbert), publikigis 20 poezivolumojn kun poeziaĵoj kaj poemoj rusaj kaj anglaj ekde 1963 ĝis 2011 j. Li ankaŭ estis aŭtoro de du dramoj "Marmoro", 1989, "Demokratio" 1991 kaj de kelkaj eseoj.

Brodski apartenis al la rusa literatura medio ligita kun poetino Anna Achmatowa. Gravaj por lia verkado estis laŭ lia propra konfeso ankaŭ poetoj Maryna Cwietajewa kaj Osip Mandelsztam.

Ĝenerale Brodski observis klasikajn principojn de versfarado kaj ĝenro, fojfoje tamen ligadis filozofiajn ripensojn kun satira pritrakto de sociaj, moraj realaĵoj de Sovetunio.

En Sovetunio en j. 1964 oni kondamnis lin pro "paraziteco", en j. 1972 perdinte civitanecon kaj spertinte ekzilon el la lando li translokiĝis al Usono. Li lektiis en usonaj universitatoj, en jaroj 1991 – 92 ricevis premion de Usona Kongresa Biblioteko kiel unua ne naskita en Ameriko poeto.

Januare, en j. 1996 li mortis en Novjorko pro la korinfarkto, en jaro 1998 oni entombigis lin sur venecia "insulo de mortintoj", sur tombejo San Michele.

En Esperanto aperis:

De nenie kun amo ..., elektitaj verkoj. 159 paĝoj, 2001 j. – tradukis Grigorij Arosev, Kris Long kaj Mikaelo Bronŝtejn.

Falas neĝ!. 1996 j. – trad. Nikolaj Lozgaĉev.

El nenie kun amo. – trad. Sergej Verŝinin

kaj tradukitaj de Mikaelo Bronŝtejn:

Al Miĥail Bariŝnikov. Mi anstataŭ sovaĝa besto eniris kaĝon. Aminjo, ekloĝu vilaĝe. En kotsezono. 1987, Kristnaska romanco. 1998, Adiaŭ.

Lidia Ligeza

Sankta Andreo – espero de knabinoj

Nomo Andreo estas tre disvastigita en tuta kristana mondo, devenas el Grekio kaj enhavas vorton anér (gen. andrós = viro).

En Pollando skribaj fontoj atestas ĝin de la jaro 1176 en diversaj formoj konvenaj por pola fonetiko kiel Andrzej, Jędrzej, Ondrzej, Andrzych. El multaj karesformoj konserviĝis nur Andrzejek kaj Jędrus. De tiu nomo devenas multaj familiaj nomoj i.a. Andrzejewski, Andrzejuk, Jędrzejewski, Jędraszewski, Jędrychowski, Jędrusik, Jędrzejczyk, nomoj de lokoj kiel Jędrzejów, Andrychów kaj ankaŭ Lvova-krakova difino de de stratbubo: andrus.

Sanktuloj je tiu nomo estas tiel multaj, ke ne eblas mencii pri ĉiuj. La plej konata estas Andreo – apostolo, fiŝkaptisto de Betsaida en Galileo, kiu kune kun frato Simeono fariĝis adepto de Kristo. Evangelio montras lin kiel homon energian kaj eman entusiasmiĝi; li partoprenis en ĉiuj la plej gravaj agoj de Kristo. Post Sento de la Spirito Andreo estis apostolo aganta en Malgranda Azio, verŝajne en Trako (terenoj de nuna Bulgario) kaj finfine en Grekio. Li estis tie finturmentita en Patras; adiaŭinte samkonfesanojn en kruco, pendante kun kapo suben, mortis 30-an de novembro de la 60 jaro. Tiu formo de kruco oni nomas "kruco de sankta Andreo" kaj starigas ĉe supertrakaj pasejoj. Ĉi dato estas lia tago en kristana kalendaro.

En IV jarcento relikvoj de sankta Andreo estis transportitaj al Bizanco, poste al itala Amalfi, la kapo estis deponita en Romo kaj redonita al grekoj en 1964 j.

La sanktulon omaĝis kaj Oriento kaj Okcidento, precipe forta estis lia kulto ĉe ortodoksuloj. Multegaj preĝejoj kaj societoj portis kaj portas lian nomon. Diversaj lokoj konfidis al li diversajn patronecojn. Li estis do patrono de fiŝkaptistoj, vojaĝantoj, buĉistoj, akvotransportistoj, kavaliroj k.t.p. Sankta Andreo helpis ankaŭ en edzecaj aferoj kaj apogis seninfanajn parojn.

Tiaj lastaj funkcioj probable forte influis al folkloro kaj ĝiaj riĉaj kaj interesaj superstiĉoj. Dum vigilia vespero antaŭ tago de sankta Andreo oni ludforme aŭ serioze aplikis diversajn aŭgurojn rilatantajn al la senta vivo kaj edzeco. Knabinoj traktis ilin pli fide ol knaboj. Tre malnova antaŭkristana tradicio ligis sanktandreajn aŭgurojn kun kredo ke dum tuta novembro mortintoj revenas al la tero. Ili, kiuj spertis multe kaj multe scias povis bone konsili al gravegaj por knabinoj aferoj de amo kaj edzecaj ligoj. Do valoras pere de sankta patrono utiligi tiun eblecon.

Andreaj aŭguroj, la plej malnovaj popolaj kutimoj apud ritoj sanktjohanaĵoj estas abunde utiligataj en literaturo. Jam en la jaro 1557 Marcin Bielski priskribis verŝadon de vakso al akvo kaj ties rezultoj. Marton Csomborn, hungara pastoro vojaĝanta tra Pollando en la j. 1616 skribas tiel: "Virinoj subiĝas al danĝeraj superstiĉoj. En vigilion de sankta Andreo, *in vigillis Andreae*, certaj el ili ĝis vespero nenion prenas en la buŝon, aŭ nur kelkajn pecetojn. Ili ĉiuj humile kaj timeme atendas venon de la nokto kaj post ĝi enlitiĝas, nudaj tiel kiel eliris el sinoj de la patrinoj – tiel ĵus estas ludoj kun satano – antaŭ litoj genuas kaj petegas sanktan Andreon per specialaj preĝoj por li montru la venontan edzon. Kredas ili sendube, ke ulo el ĉi nokta sonĝo estos pli malfrua edzo."

Pri sankta Andreo skribis ankaŭ Ignacy Krasicki: "En vigilio de festo li estas utiligata de petantaj virgulinoj, povas aŭguri la atendataj edzoj" konkorde kun proverbo: "En tago de sankta Andreo por knabinoj el aŭguro espero".

La komenco de aŭguroj ĉie aspektis simile. Knabinoj renkontiĝis vespere en plej granda domo havante kandelojn, ujon kun akvo, ringon, ŝlosilon, tuketon aŭ kapuĉeton. En aŭguroj ne partoprenis knaboj. Ĉie oni verŝis sur akvon vakson aŭ plumbon. Pro plifortigi sorĉon oni verŝis fluaĵon trans ringo aŭ ŝlosilo. Kiam elverŝita formo koagulis, oni aŭ senpere el ĝi aŭ el ĝia spuro sur vando interpretis venonton. Formo de krono aŭ ringo aŭguris edzecon, konturo de domo signifis klostron aŭ maljunfraŭlinecon, formo de lulilo aŭ embrio aŭguris needzegan infanon, kruco signifis morton.

Oni aŭguris ankaŭ laŭ alia maniero. Sur akvon en ujo oni metadis du kandletojn – kiam ili kuntuŝiĝis, la nupto jam estis proksima. Venonton oni aŭguris ankaŭ metante sub telerojn aŭ potetojn ringon, rozarion, pecon de ligno. Interesitino levis unu el ili. Ringo signifis nupton, rozario – klostron aŭ maljunfraŭlinecon, ligno – ĉerkon, do morton.

Knabinoj el urbanaj hejmoj aŭguris metante folietojn kun knabaj nomoj sub kusenoj. Post vekigo ili elektadis lotume unu el ili. Sur ĝi estis nomo de la elektito. Knabina aro laŭvice starigis demetitajn botojn. Kiu paro kiel la unua transpaŝos sojlon – tiu posedantino kiel la unua festos nupton.

Dombestoj ankaŭ povis helpi al atendanta knabino. Oni devis meti sur plankon signitajn buletojn aŭ ostojn, poste ellasi hundon. Kies frandaĵon ĝi kaptos kiel unuan, tiu fraŭlino povis esperi rapidan nupton. Pri karaktero de la venonta edzo povis informi kokino. Se ĝi elektos el preparitaj aĵoj grenon – edzo estos laborema, bona mastro, se ĝi komencos trinki – edzo havos emon al kaliko. Aŭguroj sur orientaj terenoj de lando postulis decidemon kaj preton turmentiĝi. Fraŭlinoj vespere formanĝadis salitan haringon. Tiu, kiu en sonĝo venos kun sava akvo, certe devos esti fianĉo kaj poste edzo. Knabinoj manĝis salitajn bakaĵojn, dormis sur planko kun ŝtono sub la kapo. Por pli bona efiko ŝtonon aŭ brikon, sur kiuj ili dormis, oni volvadis per la vira kalsono.

Etnografia literaturo informas pri multegaj manieroj aŭguri efike kaj certe.

Krakova Societo ESPERANTO kun tristo informas,
ke 4.09.2022 j. post kurta malsano, travivinte 68 jarojn
mortis nia kara amikino

s.† m.

Ewa Daniel

anino de Krakova Societo ESPERANTO.
La funebra entombigo okazis en Krakovo
sur Rakowice-Tombejo 9.09. 2022 j. je la 11:40 h.

Geamikoj kaj Samideanoj



Mia patrino estis tre bona kaj helpema. Kiel diverstalenta pri multaj pasioj ŝi ĉiam havis multajn planojn kaj novajn ideojn, kio rezultis per ne ĉiam ordigita nia familia vivo.

Kaj nun, kiam ŝi pasis ni strebas vivi en la nova realo kaj tio estas tra malfacila...

Post fino de la faka vojo kiel frizistino, poste magazenistino, vartistino kaj oficistino la Patrino ekinteresiĝis pri artaj okupoj. De kie mi memoras ŝi bele desegnis, precipe vizaĝojn kaj siluetojn kaj ankoraŭ ŝatis skulpti kaj modeli. Ŝi prilaboris kaj realigis vitralon- emblemon de Klubo de Socia Integriĝo, kie ofte partoprenis en kursoj kaj labor-renkontiĝoj. Tiam ŝi ekkonis arkanonj fari juvelaĵojn, vitralojn, keramikon kaj feltaĵojn. Dum tuta libera tempo ŝi faradis artaĵojn el bidoj. Per ĉi tiu pasio ŝi infektis ankaŭ min.

Antaŭ emeritiĝo ŝi fondis Galerion DeDe, kie ŝi agis ankaŭ atinginte emeritan aĝon. Fininte kurson de signolingvo kaj ekposedinte la ŝtatan ekzamenon ŝi povis labori kun ne-aŭdantaj personoj en Societo MigArt.

Iam ŝi lernis lingvojn francan kaj anglan, pasintjare interesiĝis pri Esperanto, kaj partoprenis en klubaj kunvenoj de KSE farante gravajn progresojn.

Antaŭ kelkaj jaroj la patrino ĝoje komencis studi en Popola Universitato pri Arta Metio en Wola Sękowa. Ŝi ekkonis tie novajn interesajn personojn kaj eklernis multajn novajn aĵojn. Kaj antaŭ ĉio ŝi revenadis de tie entuziasme kaj ofte kun korbo de pomoj el ĉelerneja horto por fari bongustegan pomkukon.

La Patrino amis bestojn kaj en la hejmo ĉiam estis iu besteto. Ni havis hundon, katon, hamstrojn, rateton kaj la plej veran manton. De kelkaj jaroj ni havas nur katojn. Ni ĉiam nutris libere vivantajn katojn kaj kuracis ilin; la Patrino instruis min fari injektojn, pansaĵojn, doni perfuzojn, apliki medikamentojn.

La Patrino ŝatis okupiĝi pri infanoj. Ŝi gvidis artajn okupojn en Speciala Lernejo. Ĉi okupoj nomiĝis "Gestolingvu kun kulturo". Laborante kun infanoj ŝi scipovis escepte pritrakti ĉiun etulon, ankaŭ aŭtisman elpensante komunajn ludojn kaj mensajn aktivadojn, kio povis esti ankaŭ terapio. Intue ŝi sciis trovi specialan ligan kun ĉiu zorgantulo.

Mi persone ĝis nun irante kalkulas ŝtupojn, ĉar ĉiuj infanoj lernis laŭ tiu maniero kalkuli de la plej junaj jaroj.

Ni ĉiam celebris la Tagon de Infano, la Patrino malgraŭ miaj protestoj ĉiam substrekadis, ke eĉ plenkreska infano por la gepatroj restas infano.

Mi amas tre mian Panjon. Ni ĉiuj ŝin amas kaj sopiras al Ŝi – mi, Paĉjo, tuta familio kaj niaj katoj. Ankoraŭ, bedaŭrinde, ni havis tiom da planoj por fari!

Panjo, zorgu pri ni desupre, informu nin, ke ĉe Vi ĉio en ordo... Ripozu en paco, estu feliĉa kaj ĝoja, kaj atendu nin tie. Iam ni denove renkontiĝos.

Barbara Daniel – filino